





tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

novembro 2019 / n-ro 134



-  Granda 110a jubileo de Esperanto en Bjelovar festita en septembro
-  Malfermita la nova konstruaĵo de Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac
-  Turisma agado ekfunkciis en nia ejo en Vodnikova 9
-  Kroataj esperantistoj aktivis en Hispanio, Slovakio, Finnlando kaj Italio

La fino de la jaro 2019 alproksimiĝas. Kion ni faris en la lasta duonjaro?

Post kelkaj jaroj da paŭzo membro de Studenta Esperanto-Klubo denove patroprenis en Internacia Junulara Kongreso en **Liptovský Hradok** en **Slovakio**. Pri siaj spertoj raportas **Robert Milijaš**.

Novulo ĉe Universala Kongreso de Esperanto en **Lahti** estis **Ana Alebić-Juretić**, membro de Esperanto-Societo **Rijeka**. Ŝi raportas pri siaj spertoj ĉi-numere. **Spomenka Štimec** prelegis kadre de aŭtoraj duonhoraj pri la kroata ĵurnalisto, verkisto kaj esperantisto **Dragutin Balagović** (1933-1997). Li havis multajn meritojn alproksimiginte la finnan kulturon al la kroata, kune kun sia edzino **Siiri Balagović**. Ili multe tradukis el la finna literaturo kaj organizis ekspoziciojn pri la finna arto. Al la kongresanoj en **Lahti Štimec** legis lian ĉarmoplenan rakonton *Makulo*, kiun Tempo publikigis en la numero 133. Dum la alia aŭtora duonhoraj ŝi, legis sian novelon *Bastardon*.

Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en **Lahti** partoprenis du kroataj blindaj esperantistoj **Antun Kovač** kaj **Dragutin Štoković**. Ili ĝuis la internacian etoson en la mirinda Finnlando kaj ĉeestis la deklaron de la venontjara kongresa lando **Rusio**.

La ĉefa aŭtuna evento estis granda festo okaze de la 110-jariĝo de Esperanto en **Bjelovar**, festita per abunda kelktaga programo, ekspozicio pri la historio de la Movado en **Bjelovar**, lanĉo de la monografio pri la historio de Esperanto en la urbo en kiu aktivis multaj kroataj esperantistoj. Oni muntis la memortabulon sur la domo de **Vilim Polašek**, kiu dum multaj jaroj kontribuis al Esperanto en **Bjelovar**. Speciala evento estis la malfermo

de la novkonstruita Dokumenta Esperanto-Centro en **Durđevac**, en la korto apud la domo de **Josip Pleadin**. Bunta programo akompanis la feston. Multaj ĉeestintoj, inter ili esperantistoj el **Ĉeĥio** kaj **Hungario** alportis artefaktojn por la Dokumenta centro. Ĉe la festo muzikis Rok-ensemblo el **Velika Gorica**.

La ĉi-jara deklamkonkurso estis aparte riĉa. La programon gvidis **Zdravko Seleš**. Plej multaj premioj iris al la gimnazio en **Durđevac** la pokalo al **Magdalena Mesarov**.

Granda perdo en nia Esperanto-Movado. La 9an de oktobro 2019 en **Francio** finiĝis la vivo de la nepo de Ludoviko Lazaro **Zamenhof**, **Ludoviko Zaleski-Zamenhof**.

Kroata Fervojista Esperanto-Asocio atingis ĉi-jare en **Zagrebo** sian 65-jariĝon! Jen la jubilea kuko jam pretas.

Esperantlingva poetino **Zora Heide**, kiu dum multaj jaroj vivis en **Danlando**, **Svedio** kaj **Islando** vizitis **Vodnikova 9** kaj ŝatis vidi plurajn el siaj donacitaj aĵoj (mebloj, pentraĵoj) en la nova rolo.

Ĉu vi jam konas *Verdan poemon* de **Mihaela Cik**?

Apartamento *Espera* en **Vodnikova 9** havis plurajn gastojn ĉi-somere. **Spomenka Štimec** resumas kaj memorigas kiel ni sukcesis aĉeti la ejojn en **Vodnikova 9**.

Nikola Rašić la iama prezidanto de LKK de Internacia Junulara Kongreso en **Zagrebo** 1988 gastis en **Zagrebo** la 2an de oktobro kaj kun dudeko da kunorganizantoj - esperantistoj renovigis la memorojn pri tiuj gloraj tagoj kiam IJK partoprenis 700 homoj.

La konata zagreba radio-ĵurnalistino **Vojo Šiljak** en sia radio-elsendo prezentis belan esperantlingvan kanton kaj klarigis ke ĝi estas elsendata en Esperanto.

Judita Rey Hudeček prezentis

interalie Esperanton el sia libro *Memoroj pri Makedonio kaj post ĝi* dum la literatura programo kadre de makedonaj kaj kroataj kulturvesperoj okazinta la 16an de septembro 2019 en Ĉeska beseda.

Kroata radio – la unua programo publikigis la 9an kaj la 10an de septembro du fojojn vojaĝprozon pri **Portugalio** de **Spomenka Štimec** *El la fajra lando Portugalio* en kiu diskoniĝis la riĉa historio kaj la beleco de la lastjara kongresa urbo **Lisbono** kaj ĝia etoso dum la esperantaj tagoj en 2018. La sama prozo gajnis la 5an de septembro 2019 la literaturan premion en la 13aj tagoj de **Franjo Horvat Kiš** en **Lobor**.

Dorsflanke ni omaĝas al la granda esperantlingva poeto kaj kandidato por la Nobelpremio pri literaturo **Baldur Ragnarsson** per la kroata traduko de lia poemo *Korvoj*. Kroatigis **Božidar Brezinščak Bagola**.

Spomenka Štimec

Noto: La dua jarkunveno de la jaro 2019 okazos la 16an de decembro en **Vodnikova 9**. Post ĝi sekvos la ĉi-jara **Zamenhof**-tago. Bonvenon!

Zora Heide kafumanta kun S. Štimec en Vodnikova 9, sidanta sur sia propra sofo. Fotis Teo Toplak



La jubilea festo okaze de la 110-jariĝo de Esperanto en Bjelovar



De la 20a ĝis la 23a de septembro daŭris granda festo okaze de la fakto ke Esperanto en **Bjelovar** atingis sian rondan jubileon de 110-jaroj.

La ekspozicio pri la historio de Esperanto en la urba biblioteko *Petar Preradović* estis la enkonduko al la riĉa kultura programo okazinta en la kulturdomo (la iama sinagogo) la 21an de septembro 2019. La Esperanta himno plenumita per la agrabla voĉo de la muzikisto **Vedran Milić** enkondukis la programon per kiu ni povis memori kiom da prestiĝaj esperantistoj apud **Fran Kolar Krom** kontribuis al Esperanto en **Bjelovar**. Muziklernantoj de **Bjelovar** beligis la feston en kiu eblis ekscii ke la grava pioniro de Esperanto en **Kroatio**, verkisto kaj literaturhistoriisto **Slavko Ježić** (1895 - 1969) same estis bjelovarano, dum pluraj jaroj de sia krea vivo kaj ke instruis en **Bjelovar** tia esperantlingva meritulo kia estis **Fran Novljan** aŭ literaturisto *enamiĝinta al Kroatio* **Željko Sabol** (1941-1991).

Departemento **Bjelovar-Bilogora** distingis ĉi-jare Bjelovaran Esperantistan Societon per speciala diplomo portanta la nomon de la verkisto kaj la unua prezidanto de verkisto asocio en **Kroatio**, **Ivan Vitez Trnski** (1819-1919), kiu naskiĝis en **Nova Raĉa** proksime de **Bjelovar**.

La jubilean feston en **Bjelovar** per sia ĉeesto honorigis la ĝenerala direktoro de Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio **Martin Schäffer**. Li finis sian viziton al Kroatio per vizito al la sidejo de KEL en Zagrebo.

La ĉi-jara deklamkonkurso estis eĉ pli riĉa ol kutime. Gvidis ĝin **Zdravko Seleš**. Surloke entuziasmiĝis pri recitado pluraj observantoj el la publiko. La lernantinoj de **Zdravko Seleš** el Gimnazio d-ro **Ivan Kranjčev** el **Đurđevac** montriĝis la plej bonaj recitantoj kaj gajnis plej multajn diplomojn kaj la ĉefpokalon.

Impona monografio pri cent dek jaroj de Esperanto en **Bjelovar** estis eldonita okaze de la festo el la plumo kaj arkivo de **Josip Pleadin**. La monografio estas plia pruvo

ke Esperanto plenrajte meritis esti proklamita protektita nemateria kultura heredaĵo de **Kroatio**. La monografio estis la ero de la aparta kultura programo en la urba biblioteko *Petar Preradović* la 23an de septembro kie la prezenton gvidis **Mihaela Cik**.

La pinto de la jubilea festo estis la solenaĵo de la malfermo de Dokumenta Esperanto-Centro en **Đurđevac** kien festantoj vojaĝis buse. Post multaj jaroj da apenaŭ imagebla sinoferado, per la monhelpo de diversaj flankoj de la mondo en la korto de la domo posedata de **Josip Pleadin** estis finkonstruitaj la muroj de la konstruaĵo de DEC, kiuj konservas la esperantajn arkivaĵojn. **Pleadin** diligente kolektis ilin dum sia tuta vivo. Pluraj esperantistoj el **Hungario** kaj **Ĉeĥio** persone kontribuis diversajn arkivaĵojn por la nova domo. (Ankaŭ Kroata Esperanto-Ligo jam plurfoje disponigis siajn duoblaĵojn.) La gvidanto de la ceremonio **Zdravko Seleš** deklaris ke per la malfermo la granda revo de Pleadin realiĝis. Rok-muzikistoj kaj riĉa bankedo plibeligis la belan tagon. Enkonduke al la festo en **Đurđevac** la gastoj de diversaj flankoj povis en la kastelo-galerio viziti ekspozicion de **Salvador Dali**, granda pentristo el **Katalunio**, kies gepatroj laŭdire mem parolis Esperanton.

Pleadin devos ankoraŭ multe labori por finkonstrui la domon de DEC kaj organizi la multspecajn kaj diversajn arkivaĵojn. Sur la domo jam nun troviĝas impona memortabulo pri ĉiuj kiuj plej multe helpis ke la konstruaĵo finpretiĝu. **Đurđevac** estas jam nun sur la mondmapo de Esperantujo grava arkivejo de nia esperanta historio pri kiu ni fieru.

Bjelovar, bedaŭrinde, kiel aliaj niaj urboj, inkluzive **Zagrebon**, suferas de malgranda interesiĝo pri Esperanto flanke de gejunuloj. Domaĝe ke la riĉa historio de Esperanto havas tiun ombbron kiu disvastiĝis tutplanede kaj kie **Kroatio** ne estas escepto.

Gratulon al **Bjelovar** pro la jubileo kaj al **Đurđevac** pro la nova domo de DEC!

Spomenka Štimec

DEC en Đurđevac. Fotis Davor Klobučar



Projekto "MULTLINGVA AKCELILO"

La lasta partnera kunsido

La kunsido okazis en Berlino kaj organizis ĝin tiea partnero Studio Gaus. Patroprenis 14 personoj, kiuj reprezentis ĉiujn 8 partnerojn de la 15-a ĝis la 16-a de oktobro 2019. Estis diskutoj pri la lastaj labortaskoj, ĉar la projekto formale finiĝas fine de ĉi tiu jaro, kaj pri la aferoj ĝis nun faritaj.

La plej impona estis la prezento de Eckhard Bick el la Suddana Universitato, kiu produktis 23 ekzercojn, kiuj kreas komputile konstruitajn frazojn por preskaŭ ĉiu instrubloko kaj la infanoj povos tiun programon uzi ankaŭ hejme kiel hejman instruiston. Per tiuj ekzercoj la lernantoj ekzercas gramatikon kaj novajn vortojn kaj ripetas la aferojn multfoje en diversaj kombinaĵoj. Por produkti tiujn ekzercojn estis necesa grandega kono de leksikaj leĝoj, ĉar la komputilo facile kreas ĉiujn vortajn kombinojn el donita materialo, sed kiam temas pri pli ol 200 morfemoj kaj tre kompleksa gramatiko, la kombinaĵoj estas ege multaj (por ĉiu ekzerco pluraj miloj da frazoj). Do la komputilisto devis trovi semantikajn leĝojn laŭ kiuj li malvastigos la kombineblojn. Ĉiu morfemo devis esti signita laŭ 6-10 kriterioj ekz.: la baza vorto estas viva persono aŭ ne, ĝi estas virina aŭ ne, ĝi kreskas aŭ ne ktp. Kaj tiel oni atingis finan celon ke por ĉiu ekzerco la komputilo stokis centon da sencohavaj frazoj. Tiu ekzerco estas unika en lingvolernado, ĉar por bone sukcesi oni devas kapabli krei frazojn kaj ekzerci tion multe. Sen tio, teoria scio pri E-gramatiko kaj kono de nemultaj vortoj ne sufiĉas por kompreni la profundan logikon de lingvo kaj per lerno de tiu minimuma Esperanto oni ne esence faciligas la postan lernadon de aliaj fremdlingvoj. Helpe de ĉi tiu ekzerco tiu ĉi problemo estas solvita.

Profesorino Alja Lipavic Oštir el Universitato de Maribor prilaboras science diversajn enketojn kaj testojn: a) Testojn kiujn plenigis kaj la infanoj lernintaj E-on kaj paralelaj grupoj kiuj ne lernis, por konstati kiom vere la E-lernintoj pli bone komprenas aliajn

fremdlingvojn kaj rekonas iujn gramatikaĵojn, kiujn la nelernintoj ne rekonas – do kiom da propedaŭtika celo ni atingis; b) Testojn kiujn same plenigis la lernintoj de Esperanto kaj nelernintoj, laŭ kiuj eblas konstati kiom unuj kaj aliaj rekonas gramatikaĵojn en la propraj lingvoj, kion ili antaŭe ne lernis – por tiel vidi kiom da metalingva kono ili akiris; c) Enketojn pri kontenteco rilate la lernobjekton kaj la metodon, kiujn plenumis kaj la lernantoj kaj la instruistinoj kaj la gepatroj; d) La instruistinoj plenigos ankaŭ enketojn kiuj pristudos kiel ili elturniĝis instruante lernobjekton kiun ili antaŭe ne studis, uzante nur instrukciojn kaj iom da minimuma helpo de kvalita e-instruisto. Tiu enketo volas vidi kiuj metodoj kaj didaktikaĵoj ebligis al ili instrui E-on.

Tiuj sciencaj rezultoj estos parto de la fina rezulto de la projekto kaj aperos en la fina raporto. Oni interkonsentis, ke la baza lingvo por retraduki la tutan instrukciaron kaj didaktikon al diversaj lingvoj estos Esperanto. Tiu laboro traduki al minimume 6 eŭropaj lingvoj ankoraŭ devas esti farita antaŭ la jarfino. Ĉar la fina raporto devas esti liverata al eŭropaj pritaksantoj ĝis la fino de februaro, verŝajne ankaŭ la tuta portalo estos preta en februaro, kiam ĉiuj en EU povos uzi ĝin, se ili konas almenaŭ iun el la 6 naciaj lingvoj, Esperanton kaj la anglan.

Oni diskutis ankaŭ pri la publika disvastigo de la projekto kaj konstatis ke la E-publiko estas bone informita, sed la neesperantistaj geinstruistoj kaj lernejoj ne.

Mi ankaŭ nun invitas la esperantistojn, kiuj pretas traduki E-arikolojn aŭ verki la proprajn artikolojn en siaj naciaj lingvoj por lokaj lernejoj instancoj kaj instruistaj publikaĵoj. Kiam aperos publike la portalo, oni povos nacilingve informi ĝeneralajn publikrimedojn. La celo estas, ke laŭeble multaj instruistaj organizaĵoj, ministerioj pri edukado kaj lernejoj eksciuj pri ekzisto de tiu ĉi unika lernobjekto, tuj uzebla, por rapidigi lernadon de komplikaj naciaj fremdlingvoj.

Zlatko Tišljarić

PLANLINGVOJ en Filozofia fakultato en Zagreb

Studobjekto Planlingvoj en Filozofia fakultato en Zagrebo instruata ankaŭ en vintra semestro de la akademia jaro 2019/2020

La nedeviga studobjekto *Planlingvoj*, jam pli ol 10 jarojn tradicie instruata por bakalaŭraj studentoj de la germana lingvo kaj literaturo en Filozofia fakultato de Universitato de Zagrebo, okazas ankaŭ en la vintra semestro de la aktuala akademia jaro 2019/2020 kun 31 partoprenantoj. La enkondukaj lecionoj estas dediĉitaj al la konciza prezentado de la fenomeno lingvoinventado dum la homa historio kun speciala atento al Esperanto kiel fakte la ununura plene funkcia planlingvo ekde sia apero en 1887. Pri traktataj estas ankaŭ la ĉefaj nocioj de interlingvistiko kiel scienco pri internacia komunikado ĝenerale kaj pri planlingvoj speciale. Por ke la studentoj mem spertu la lernadon de planlingvo, kadre

de la studobjekto *Planlingvoj* estas instruata Esperanto por komencantoj surbaze de la germanlingva eldono de la Esperanto-lernolibro laŭ la Zagreba metodo. Kvankam ja tuj ekde la komenco de la enkadrigo de tiu nedeviga studobjekto en la studprogramon de la germana lingvo kaj literaturo estas aŭdataj malmultaj skeptikaj voĉoj pri kongruebleco de *Planlingvoj* kun celoj de la studprogramo de la germana lingvo kaj literaturo, oni povis intertempe konvinkiĝi, ke ĝi estas tre ŝatata de studentoj – ne nur pro la facila kaj kleriga lernado de Esperanto kaj gaja lern- kaj instruotoso. Tiusence gravas ankaŭ la fakto, ke en ĝi unuflanke estas pritraktataj temoj el ĝenerala kaj kompara lingvoscienco konsiderante la lingvajn kaj filologiajn konojn de partoprenantaj studentoj, kaj aliflanke oni malkovras kaj analizas leksikajn kaj vortformadajn elementojn de la germana en Esperanto.

Velimir Piškorec

85-a Internacia kongreso de blindaj Esperantistoj

La 85-a Internacia kongreso de blindaj esperantistoj (IKBE) okazis en urbo **Lahtio (Finnlando)** de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2019. Samtempe la urbo Lahtio estis gastiganto de la 104-a Universala Kongreso de Esperanto (UK). La organizanto de IKBE estis Steleto, Esperanto-Asocio de Vidhandikapitoj en **Finnlando** kiu ĉi-jare festas sian cent-datrevenon.

En IKBE partoprenis 49 esperantistoj kun gvidantoj el 12 landoj. Delegacio de Kroata unuiĝo de nevidantaj Esperantistoj (KUNE) konsistis de tri membroj: **Antun Kovač**, **Dragan Štoković** kaj **Spomenka Štimec**, helpanto de nevidantoj. Ĉi tiu kongreso ne havis apartan temon, anstataŭe estis prezentitaj prelegoj, plejparte pri finnaj sociaj aferoj rilataj al vidhandikapitoj.

Malfermo de la 85-a IKBE komenciĝis la 20an de julio. Kiel gastiganto kaj prezidanto de la pasintjara IKBE en **Kroatio**, la kongreson malfermis kaj salutis nome de KUNE **Antun Kovač**. Prezidantino de LIBE **Nedeljka Ložajić** estris la kongreson kun **Borje Erikson**, prezidanto de Steleto (FI), **Attila Varro** (HU) kaj **Anatolij Masenko** (RU), **Ritva Sabelli** (FI) kaj **Pavel Rjabov** (RU).

Prezidanto de Loka Kongresa Komitato de UK **Tuomo Grundstrom** tralegis la salutmesaĝon de d-ro Mark Fettes, la prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio. Sekvis prelegoj: *Ĉe la radikoj de defendo de rajtoj* (d-ro **Kari Huuskonen**), estro de la finna blindulmuzeo kaj *La situacio de handikapuloj en Finnlando* (**Matti Ojamo**), esploristo ĉe la laŭleĝa Registro pri handikapitoj.

Sekvis ankoraŭ kvar prelegoj: prelegon *Sensoj kaj senbara medio* de blinda d-ro **Jukka Jokiniemi** tralegis **Dragan Štoković**, **Raita Pyhala** prelegis pri finna kuirarto, **Anita Dagmarsdotter** parolis pri finnaj popolkostumoj kaj popoldancoj kaj **Kunio Tanabe** el **Japanio** parolis pri sia amiko, kiu trairis la **Pacifikon** per jakto. Multaj ŝatis informiĝi pri la japana vesto kimono kiun prezentis **Kikušima Kazuko- Krizantemo**.

La ĝenerala asembleo de LIBE akceptis du raportojn: sekretarian kaj financon, delegitajn raportojn pri la esperanta movado en landaj organizaĵoj, raporton pri LIBE Biblioteko ktp. En sia raporto LIBE delegito el **Kroatio** aparte akcentis decidon de Ministerio pri kulturo laŭ kiu Esperanto ricevis statuson de nemateria kultura heredaĵo en Respubliko **Kroatio**. Rusia delegacio informis ke Rusia Esperanto-Asocio de nevidantoj intencas organizi la venontan 86-an IKBE en Rusio – decido estos anoncita en Esperanta ligilo. Ni jam scias ke la kongreso okazos en **Moskvo** de la 27-a de junio ĝis la 4-a de julio 2020. Kadre de la kunsido estis elektita komisiono por la esperanta brajlo: **Attila Varo**, **Anatolij Masenko** kaj **Otto Prytz** (NO), la iniciatinto de tiu aktivado.

Gravas akcenti ke LIBE subskribis dokumenton pri kunlaboro kun ILEI. Aparte interesa estis nia ekskurso la 24-a de julio. La ekskurso komenciĝis per krosado sur la lago **Vesivarji** en eta ŝipo. Poste ni vizitis artgalerion de artistino **Asta Pulkkinen** en **Hollola** kaj la mezepokan ŝtonan preĝejon kaj la farmobienon **Kinnarila**. Ĉiu el ni ricevis saketon da freŝe muelita sekala faruno, kune kun la esperantlingva recepto por sekala kaĉo.

Per la adiaŭa vespero la 26-an en la restoracio **Lokki** ĉe la lago **Vesijarvi** la kongreso finiĝis.

IKBE-anoj laŭ intereso ĉeestis programerojn de UK. Tiumaniere ni travivis tre sukcese du kongresojn. Por la fino de mia artikolo mi aldonas la kongresan limerikon de **Otto Prytz**:

*En Lahti abundis aranĝoj
Kaj ankaŭ ekskursoj kun manĝoj
En saŭna veter',
Sed ĉefa afer':
Atenti pri la programŝanĝoj.*

Antun Kovač

Vizito de Nikola Rašić

Vizito de Nikola Rašić al E-Societo „Tibor Sekelj“ en Zagrebo

La 2-an de oktobro okazis en la ejoj de Kroata E-Ligo kunsido de la zagreba E-societo „Tibor Sekelj“. Kaj la speciala gasto estis Nikola Rašić, iama Zagrebano, longjara KKS (Konstanta Kongresa Sekretario) de UEA kaj nun roterdama interpretisto inter pluraj lingvoj. La aparta atento estis dediĉita al la lasta aranĝo kiun li gvidis kiel LKKano en Zagrebo – Internacia Junulara Kongreso de TEJO en la jaro 1988. Kunvenis pluraj tiamaj kunkreintoj de la programo de tiu dua laŭ grandeco TEJO-kongreso (700 kongresanoj) kaj alportis dokumentojn, fotojn kaj memorojn. Estis rememorinda vespero ĉar oni elvokis multajn jam forgesitajn faktojn pri tiu ĉi kongreso. Ĝi programe enhavis novaĵojn antaŭe neviditajn kaj kelkaj el ili ankaŭ neniam poste ripetiĝis. Ekz. Dum tiu ĉi IJK tri radio stacioj ĉiutage elsendis apartan elsendon dediĉitan al ĝi: Radio Zagrebo en Esperanto, Radio Sljeme pri zagrebaj eventoj kaj Junulara Radio. Sed la plej grava novaĵo estis ke speciala teamo gvidata de Kruno Tišljar kaj reĝisorata de Romana Rožić preparis ĉiutage duonhoran video-raportaĵon kiun



Nikola Rašić. Fotis Kruno Tišljar

oni elsendis vespere kiel iuspecan televidan tagĵurnalon, kiun kun ĝuo rigardis preskaŭ la tuta kongresano. En arkivo ni ankoraŭ posedas konservitaj tiujn tagĵurnalojn. La raporto pri tiu ĉi kongreso estas dekpaĝa kun multegaj detaloj. Nikola Rašić parolis pri siaj memoroj kies detaloj por ni aliaj estis jam forgesitaj.

Zlatko Tišljar

La unuan plenan jaron ni pasigis en Vodnikova 9. Kiel eblas ke ni, Kroata Esperanto-Ligo, eta asocio, aĉetis tiun imponan ejon?

Kiuj estis la plej gravaj punktoj kiuj ebligis ke en la jaro 2003 ni aĉetu la ejon?

Plej multe gravis du faktoroj: unue la konscio ke la ejo gravegas por la societa vivo. Tiun scion ni akiris per la 50-jara restado en la nun jam mita loko Amruševa 5. Tiun ejon “havigis” por ni **Ivo Lapenna** kaj **Nadica Gropuzzo**. La zagrebaj esperantistoj uzis la ejon ekde la printempo 1947 ĝis 1999. **Lapenna** kaj **Gropuzzo** ricevis la permeson de **Mijo Repar** uzi parton de la granda loĝejo kiu estis disponigita al li. Li estis advokato, zorganta pri naciigo de la privataj loĝejoj en la postmilita **Zagrebo**. Ni uzis la ejon dum jaroj surbaze de la buŝa permeso de la uzanta advokato ke la ejon uzu Esperanto-Societo *Bude Borjan* kaj Kroata Esperanto-Ligo (laŭ la rakontoj de Ivo Borovečki). Kiam en 1957 estis fondita Studenta Esperanto-Klubo ĝi same uzis la ejon. En la sesdekaj jaroj la advokato **Repar** petis esperantistojn ke ili redonu al li la etajn ejojn en kiujn li loĝigis la familion **Bjelić** pri kiu **Repar** zorgis. La grandajn ejojn kaj la banejojn esperantistoj daŭre uzis. Kiam estis fondita Internacia Kultura Servo en 1972, ankaŭ ĝi uzis la ejon. Kiam la iamaj posedantoj en la 1990-aj jaroj denove havis juran eblecon reakiri la ejon, ili entreprenis juran procezon por tio. La procezon komencis **Marija Delija-Krnić** kaj finis en 1999 **Željko Krnić**.

Antaŭ ol nia advokato **Ranko Tomašević** transdonis la ŝlosilojn de Amruševa 5 al la posedanto **Željko Krnić**, Kroata Esperanto-Ligo kandidatiĝis por organizo de la 86a Universala Kongreso de Esperanto en **Zagrebo**. La zagrebaj urbaj instancoj disponigis al ni la novajn ejojn en Str. Kneza Mislava 11. Tie ni havis nian sidejon kiam ni organizis Universalan Kongreson de Esperanto en 2001 kaj kiam ni en 2003 aĉetis la novan ejon en Vodnikova 9. Dum ni loĝis en Knez Mislav 11, ni la tutan tempon pagadis lupagon al la urbo. Post kelkaj jaroj la urbo **Zagrebo** tribunale perdis la ejon en Knez Mislav 11, ĝia nova posedanto fariĝis la ŝtato. Al ĝi ni daŭrigis pagi lupagon.

La aĉeton mem ebligis la pozitiva saldo de KEL rilate al Universala Kongreso de Esperanto en **Zagrebo** al kiu multe kontribuis la laborego de niaj membroj, kiuj trovis diversajn subvenciojn. (Specialan dankon al **Karmen Crnković Vranko** kiu trovis senpagajn busojn por parto de niaj ekskursoj. Specialan dankon al **Željko Gubijan** kiu en 2001 kapablis havigi senpagan tagmanĝon en la arbaro Česma, kie oni super la fajro rostis la karpojn sur bastonetoj. **Željko** dum la preparlaboroj ne tuj diris *ne* (kiam li anoncis ke tiun manĝon povus senpage ĝui *unu buso da ekskursintoj*) Mi aŭdace demandis Ĉu ne eblas *du busoj*? Poste montriĝis ke la kongresanoj en la du busoj estis la gastoj de Hrvatske ŝume, inkluzive de la fama aŭstralia diplomato **Ralph Harry**.

Specialan dankon al **Vjekoslav Morankić** kies vizio spronis la aĉeton de la ejo en Vodnikova 9 kaj kies scio gvidis ĝin kaj al **Boris Di Costanzo** kiuj permesis ke Esperanto-Domo en **Kostrena**, la posedo de Esperanto-Societo **Rijeka**, servu kiel la garantiaĵo por la kredito de Raiffeisen-banko al KEL. La aprobata kredito estis 50.500 eŭroj.

Dankon meritas **Zlatko Tišljar Pajo** kiu per la mono de la Kroata Loterio por Kroata Esperanto-Ligo en



Fotis Biba Rožić

la 1980-aj jaroj aĉetis nefinkonstruitan teretaĝan ejon en **Velika Gorica**. Per stranga eraro tiu ejo estis registrita kiel posedaĵo de Internacia Kultura Servo (IKS). IKS, esperantista firmao, tiam faris kontraktajn laborojn por KEL, sed post kelkaj jaroj ne plu. Tamen, la ejo restis ilia havaĵo. Post 15 jara luktado de Spomenka, Kroata Esperanto-Ligo sukcesis pruvi ke tiu ejo estis aĉetita per mono de Kroata Loterio donita al KEL kaj devus esti registrita posedaĵo de KEL, kio finfine realiĝis.

Apartan dankon al **Nedeljko Korasić** kiu investis sian propran kapitalon el 40.000 eŭroj kiam, kelkajn jarojn poste, la bankaj interezoj estis tro altaj por niaj financaj kapacitoj. Li transprenis la krediton al si, kontraŭ favoraj kondiĉoj al KEL (malpli alta interezo kaj pluraj prokrastoj). Post multaj jaroj KEL plene elpagis tiun krediton al **Nedeljko**.

Dankon meritas Fondaĵo **Trixini** pri kiu zorgis **Spomenka Štimec** kaj **Judita Rey Hudeček** kies malavara prunto de 11.600 eŭroj helpis finpagi la novan ejon en Vodnikova 9. (Tiu prunto estas grandparte repagita. La ŝuldo en 2019 estas ankoraŭ 2.509.03 eŭrojn).

Specialan dankon al Universala Esperanto-Asocio kiu mem donis la krediton de 5.000 eŭroj, permesante ke ni iom post iom repagadu la monon de UEA, gajnitana per la sukcesa kongreso en Zagrebo.

Nian dankon havu ankaŭ **Marija** kaj **Tonko Francesković** kiuj vendis al ni la loĝejon kaj mem donis al ni krediton de 5.000 eŭroj, kiun ni tuj kiam eblis elpagis.

Specialan dankon al iom malpli ol 300 membroj kaj amikoj kiuj de 2003 ĝis la jaro 2019 enpagis pli ol 950 fojojn helpon al nia konto por Vodnikova.

Inter aliaj donacintoj ni devas aparte elstarigi Esperanto Societo **Rijeka** (kiu, interalie, nuligis nian ŝuldon el 2.400 eŭroj) **Anto Mlinar**, **Davor Klobučar** kaj **Roger Imbert** kies helpo estis kontinua, kiam ajn necesis.

El tiuj subtenoj eble apartaj estis plurfoja helpo de **Kikushima Kazuko** kaj la simbola helpo de esperantisto el la ĝemela urbo al **Zagrebo - Kioto!** Neforgeseblan helpon donis **Zora Heide**.

Tre kortuŝan helpon alportis nia membro **Bojana Đuričić**, kiam ŝi ricevis kompencon pro la fakto ke knabinaĝe ŝi estis kaptito de la koncentrejo **Jasenovac!**

Ne malpli surprizan helpon sendis **Julia Sigmond** el **Cluj** (Rumanio), trovinte 10 kunaĵojn en iu koverto, tre bone komprenite ke ĉiu ereto gravas.

Sed ni ne povus ankoraŭ longe elpigi niajn kreditojn se ne ekzistus tiaj helpemaj membroj kiaj estas **Blanka Pavlović-Devčić** kaj **Mira Matanović-Manner**. **Blanka** volis heredigi al KEL 5.000 eŭrojn sed inspirita de iu

TV-elsendo, decidis enmanigi la monon tuj. **Mira Matanović-Manner** mortis subite, ŝia heredanto estis ŝia frato **Anto Matanović**. Li bone konis kiom **Mira** kaj ŝia edzo **Mirko** amis Esperanton kaj li decidis iom el ŝia heredaĵo donaci al ni, kondiĉe ke la foto de **Mira** kaj **Mirko** pendu en nia kunvenejo, kun la informo ke ili donacis 5.400 eŭrojn. Vi povas vidi la donacilon super la enirejo al nia ĉefĉambro en Vodnikova 9. Tiu ĉambro portas la nomon **Mira** kaj **Mirko**. **Blanka** estis kuiristino kiu eldonis kelkajn kuirlibrojn pri kukoj. Nia eta kuirejo portas la nomon **Blanka**.

Vizitis nin sponsoro preta helpi kaj rimarkis ke **Lucija Borčić** havas nomon sur neniu el niaj pordoj. **Luci** laboris plej multe por Esperanto! Ŝi havu sian ĉambron en Vodnikova! La sponsoro kiu petis resti anonima, enpagis 6.650 eŭrojn por helpi al ni pagi la kreditojn de Vodnikova! Nia biblioteka ĉambro nomiĝas **Luci**.

Dum la lastaj 16 jaroj ni ne nur devis repagadi kreditojn sed ankaŭ investi en Vodnikova por plibonigi ĝin. Ekz. pro la malnoviĝinta hejtsistemo la urba gasfirmao ordonis en 2009 urĝe renovigi la hejt-instaladojn en Vodnikova. Kiel renovigi? De kie la mono? Per kredito el 4.600 eŭroj helpis nia membro kaj vicprezidanto **Davor Klobučar**. La repago komenciĝis nur post ses monatoj kaj daŭris jaron kaj duonon. Samtempe daŭris repagado de la granda kredito al **Korasić**, sed li permesis prokraston ĝis plena elpago al **Davor**.

Niaj membroj **Zlata Nanić** kaj **Ankica Jagnjić** (kaj nia amiko **Nikola Rašić**) komprenis kiom gravis renovigi la ejojn antaŭ ol enloĝiĝi. Ili kune pruntis al ni 2.000 eŭroj por la renovigaj laboroj de nia ejo. En novembro 2019 ni kolektas monon por repagi nian ŝuldon al **Zlata**. La aliaj du sekvos poste.


La monon ni uzis por beligi unu trionon de nia ejo, kiun ni transformis al Apartamento **Espera**. Per la kontrakto kun la firmao **Izvori** (registrita ne nur por eldonado sed ankaŭ por turisma agado) ni funkciigis **Apartamenton Esperan** al la zagrebaj turistoj ekde marto 2019. La koncernaj urbaj instancoj registris la Esperon kiel 3-stelan ejon. Por ke la turisma agado funkciu, zorgas la triopo de Izvori, esperantistoj **Damir Mikuličić** kun sia filo **Filip Mikuličić** kaj **Slavica Štefić**, la edzino de **Damir** (kaj direktoro de Izvori.)

Ni memoru: per la decido de la jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo (februaro 2003) ni decidis aĉeti nian novan ejon en Vodnikova 9. Ĝi kostis 108.000 eŭroj. Ni devis tuj havi pliajn 5.000 eŭrojn por pagi imposton. Kiam Raiffeisen-banko aprobis al ni la krediton de 50.500 eŭroj, ni devis preni plurajn diversajn kreditojn aldone por akiri la necesan sumon el 108.000 eŭroj kaj por akiri la rimedojn por pagi impostojn kaj elspezojn de la kreditoj.

Nun, 16 jarojn poste, kiam ni jam plene uzas Vodnikova 9, kaj kiam ni elpagis multajn kreditojn, nia aparta novembra memoro iru al 52 mortintoj sur la listo de niaj sponsoroj. Ili estis membroj kaj amikoj kiuj kredis je ni:

Zlata Flego
Aleksandar Kocian
Boris Čović
Jerko Baković
Karmen Crnković Vranko
Sava Matetić-Lučić
Dalibor Brozović

Blaž Rocek
Vida Jerman
Dragan Barac
Lucija Borčić
Ivo Puharić
Gordana Štrlić
Radenko Milošević
Dinka Šimunić
Đuro Smeh
Blanka Pavlović Devčić
Mira Matanović-Manner
Stanko Rukelj
Aleksije Herić
Štefica Mutak
Jakov Krpan
Mato Brčić-Kostić
Dinko Matković
Ivo Borovečki
Miroslav Jelkovic
Tomislav Plačković
Edith Zuchowski
Ginette Martin
Vlado Jurković
Josip Vrančić
Damir Rak
Ratimir Metz
Vera Brigljević
Josip Šlat
Franjo Šlabek
Marija Repac
Zdravko Jakovljević
Draško Toplak
Vinko Milinković
Karmen Crnković-Vranko
Josip Sabljic
Petar Pazaver
Mirjana Žeželj
Nevenka Palković
Emilija Obradović
Roger Imbert
Davor Grgat
Rajka Štimec
Anto Matanović
Anka Špehar-Šantolić
Josip Silić



Ankoraŭ unu kuriozaĵo: Esperanto - Societo **Rijeka** iniciatis apartan manieron kontribui al la repago de niaj kreditoj. Kiam iu membro de la societo en **Rijeka** mortis, oni nek aĉetis florkronon nek publikigis la adiaŭan saluton en loka gazeto sed pagis al KEL, kun indiko en Tempo *anstataŭ floroj sur la tombo de....*

Pluraj homoj kaj societoj imitis tiun kutimon. Tiel en niajn ejojn en Vodnikova 9 estis enkonstruitaj eĉ 30 florkronoj!

Kaj ankoraŭ io grava: nuntempe, kiam ni mem uzas la ejon en Vodnikova kaj kiam ni disponigas nian ejon al turistoj, dek niaj membroj ĉiumonate pagas regulan kontribuon al Vodnikova por helpi ĝin funkciu. (Iu pagas 500 kn, iu 30 kn, ĉiumonate.) Tio estas la sekreto de nia ĝisnuna sukceso pri kiu multaj dubis.

Dankon al ĉiuj kiu helpis! Specialan dankon al la personoj kiuj administris la pagojn dum 16 jaroj: **Ljerka Stilinović, Ruža Tišljar, Jadranka Farszky**.

Eĉ Zamenhof fierus pri ni.

Spomenka Štimec

Pri la Internacia Junulara Kongreso en Slovakio

Sidanta en la trajno EC 277 el Bratislavo al Budapeŝto, mi vojaĝas hejmen el mia unua Internacia Junulara Kongreso. Mia aventuro ekis la 28-an de julio je la kvara matene. Malgraŭ la mallonga dormado mi ne sentis lacecon ĉar mi devis kapti mian autobuson. Ege ekscitita mi pensas pri la venonta vojaĝo.

Post kelkajn horojn mi proksimiĝas al Vieno. Strauss muzikas en miaj kapaŭdiloj dum mi rigardas la turojn de la urbo. Bedaŭrinde ne estis okazo por konatiĝi ĉar mi devas ŝanĝi buson kaj atingi Bratislavon por preni la trajnon al Košice.

Slovakio ege belas kaj rigardante la pejzaĝon mi forgesas pri la tempo. Mi preterpasas la belegan kastelon apud Trenčín. La trajno dancas inter la montoj kaj lagoj de la Liptov regiono kaj mi baldaŭ atingas mian celon - Liptovský Mikuláš. Sur la platformo staras verdaj T-ĉemizoj. Jen Esperantujo.

La grupo de esperantistoj kaj mi baldaŭ atingas la IJK ejon en Liptovský Hrádok per taksioj. Babilante mi atendas ke Vít ekkriu mian kongresan numeron 168. Baldaŭ mi iras al mia ĉambro. Registrita, sata kaj ege dormema.

Morgaŭ, post la solena malfermo mi iras al la novula programo. Tie spertaj IJKanoj, anĝeloj, malkovras ĉiujn sekretojn de la IJK. Post kelkaj ludoj, unu grupo da novuloj kaj mi faras nian propran programon: kafumadon en la proksima kafejo. Tempo plirapidigas sian paŝon. Kun la aliaj novuloj mi ofte kafumos kaj kursumos dum la aranĝo.

La semajno pasas rapidege. Antaŭtagmeze kursoj - B1 kaj B2 nivelo de Esperanto kun Sabi el Hungario. Posttagmeze diversaj programeroj: origamo, tema kinejo, aligatorejo, klasika kantado.

Ĉu mi prenu kurson de la slovak aŭ de la hungara? Aŭ ĉu mi simple aliĝu iu grupo de esperantistoj kaj iru en la kafejon? Estis sufiĉe da programeroj por ke ĉiuj el la ĉirkaŭ 250 IJKanoj el 35 landoj povus amuziĝi.

Ankaŭ, oni devas elekti kien ekskursi. La tasko ne facilas ĉar oni devas elekti inter Spiš, unu el la plej grandaj kasteloj en Eŭropo, ekskurson al la urbo Košice, Goralaj juveloj, aŭ simplan promenadon tra ĉarmaj vilaĝoj kaj la ĉirkaŭa naturo. Por mi venkis la ekskurso al la kastelo ĉar laŭvoje estis multe da heredaĵoj protektitaj de UNESCO kaj la naskiĝdomo de Tibor Sekelj.

Vespere okazis mia favora programero: ek al la gufujo! Kartludoj kaj tablo-ludoj kun amikoj estis tre interesaj. Ne nur pro la ludado, sed ankaŭ ĉar ni samtempe parolis la kroatan, la ĉehan kaj la slovakon kaj komprenas unu alian.

Kompreneble, la gufujo ne estis la sola vespera programero. Ĉu vi volas moviĝi? En la diskejo oni instruas baĉaton, salson kaj



Fotis Karina Oliveira

aliajn dancojn. Kaj kiam vi ne plu dancemas vi povas sidiĝi ĉe la babilemaj homoj en la trinkejo.

La IJK ne estas nur okazo por amikumi kaj plibonigi sian Esperanton. La IJK estas bonega ŝanco por plivastigi vian reton de kontaktoj kaj informiĝi pri la movado. Ekzemple, dum la aranĝo okazis laborgrupo de TEJO pri universitata agado. Ĉe la ronda tablo sidis homoj el 11 universitatoj kaj el 8 landoj kaj diskutis pri universitataj Esperanto-Kluboj. Mi partoprenis la laborgrupon kiel reprezentanto de la Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo. Dank' al la kunsido miaj klubanoj baldaŭ havos multe da kontaktoj kun eksterlandaj esperantistoj ĉar unu el la celoj de la laborgrupo estas krei reton de studentaj Esperanto-asocioj por internacia kontakto.

La tempo forflugis, finiĝis la ekskursoj, ne plu estas prelegoj, restas nur la solena fermo kun la solena transdono de la IJK flago al la organizantoj de la venonta IJK en Someren, Nederlando. Poste, en la gufujo, multe da brakumado kaj iomete da ploro. Finiĝis la 75-a IJK kaj oni devas diri: ĝis la venonta renkontiĝo. Survoje al Varaždin, mi esperas ke tio estos baldaŭ.

Robert Milijaš



75-a Internacia Junulara Kongreso

Rijekanino en UK en Finnlando



Kvankam mi estas maljuna, mi estas juna esperantistino. Mi lernis Esperanton antaŭ mallonga tempo. Pro tio ke mi ne povas plibonigi ĝin hejme, ĉar mi ne havas disponeblan tempon, mi decidis partopreni al la Itala Kongreso ekde la 2016 jaro. Oni diris al mi ke tio estas malbona ĉar mi povas krokodili kun italoj. Ne estas vere, kaj mi decidis partopreni al unu Universala Kongreso de Esperanto. Tio okazis en monato Julio en urbo Lahti en Finnlando.

Finnlando estas multtekosta lando, kaj mi havis bonŝancon aĉetinte malkaran aviadilbileton. Mi havis kunĉambrinon el Pollando kiu estas ĵurnalistino ĉe Pola radio laboranta por Esperanto tutan laborvivon. Lahti estas nova urbo pli bone konata je rilato al diversaj sportoj, kiel skiado, skipado kaj glacihokeado. La Kongresejo estis organizita ĝuste en la glacihokea stadiono. Kelkaj esperantistoj ne estis kongruantaj kun tiu ideo, al mi tiu ideo plaĉis. Oni havis sufiĉan spacon por organizi diversajn aktivecojn. Oni povis partopreni al prelegoj, seminarioj, esperantaj kursoj, al la koruso k.t.p. Oni povis aliĝi ankaŭ al piedpilka teamo "Esperanto" kiu ludis ekstere sur loka kluba kampo kaj gajnis piedpilkan matĉon ludante kontraŭ loka piedpilka teamo. En ambaŭ teamoj ili havis po du virinojn, ne nur por plibeligi la teamon.

Mi priskribas ekskursojn, duon- kaj tuttagan organizitajn dum la Kongreso. Ne estis facile decidi ĉu partopreni al la prelegoj aŭ ekskursoj. Normale ekskursoj ĉiam venkis. Partoprenon al la ekskursoj oni povas akcepti kiel konversacian kurson de lingvo Esperanto. Bona ekskurso ĉiam bonvenas. Mi decidis partopreni al ekskurso per kiu ni vizitis domoj de famaj Finlandaj artistoj. Komponisto Julius Sibelius, pentristo Pekka Halonen el la 19a jarcento, kaj Joonas Kokkonen, komponisto el la 20a jarcento. Sibelius kaj Halonen havis siajn domojn



sur lago Tuusula. Ambaŭ domoj estis konstruitaj el ligno, sed la domo de la pentristo estas pli bela, oni vidas ke li edzinigis riĉan virinon. Familioj de ambaŭ artistoj ne povis prizorgi menciitajn domojn kaj vendis ĝin al la ŝtato. La domo de Joonas Kokkonen estis projektita de tre fama desegnisto Alvar Aalto senpage. Bone, sed estas pli facile desegni ol konstrui la domon. La domo estis konstruata dum la jaro 1960a kaj estas rimarkinda. Juna geedza paro da muzikistoj zorgas pri la domo kaj estas pagataj per mono gajnita de vizitantoj kaj vendado de memoraĵoj. Vizito al tri domoj de artistoj al mi ne sufiĉis. En la fino mi vizitis ankaŭ la domon de unu vivanta artisto, Timo Väänänen kiu ludas diversajn specojn de citroj. Ni aŭskultadis koncerton kun klarigoj en Esperanto. Krom la koncerto ni havis ankaŭ vespermanĝon en lia domo. Lia domo konsistas el du konstruaĵoj: unu malnova kaj unu nova. Estas konektitaj unu kun alia pere de ĝardeno inter.

Universala Kongreso organizis ankaŭ junularan kaj infanan kongresojn kun iliaj apartaj programoj. Mi ne povas diri ion pri tio ĉar mi ne partoprenis al tiuj aranĝoj. Mi estas certa ke ili estas tre interesaj renkontoj.

Ana Alebić - Juretić

Domo-Villa Kokkonen desegnita de tre fama Finna desegnisto Alvar Aalt



La hokejsalono en urbo Lahti - Kongresejo de la 104a UK

En la fino de la jaro 1954, pli precize la 23-an de decembro, estis fondita Fervojista Esperanto-Societo **Zagreb**, kiu ĝis la 1956 estis en la kadro de Laborista Esperanto-Societo. Ĝia unua prezidanto estis **Franjo Debić**. Post politikaj kaj sociaj ŝanĝoj en **Kroatio** kaj la eksa **Jugoslavio**, nepre antaŭ la morto de ĝia tiam prezidanto **Veljko Šegrc**, fine de la jaro 1991, estis proponita nomo Kroata Fervojista Esperanto-Societo (KFES). En la jaro 1992 tiu nomo fariĝis oficiala. **Kroatio** sendependiĝis kaj KFES aliĝis al Internacia Fervojista Esperanto-Federacio dum IFEF kongreso en **Münster (Germanio)**. En la jaro 1998, pro insistoj el IFEF pri la nomo, estis ŝanĝita la tiam nomo al Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA). KFEA en la jaro 2019 havas 20 membrojn.

En la jaro 2018 mortis nia estrarano **Boris Ĉović**. En la jaro 2019 dum jarkunveno de KFEA estis elektita la nova estrarano kun la prezidantino **Roža Brletić-Višnjić**. Ŝi estis sekretario ekde la jaro 2010 kaj kursgvidantino ekde la jaro 1995. Dum la jarkunveno adiaŭis la longjara prezidantino **Marica Brletić**, laca post 27 jaroj da aktivado. Ankaŭ demisiis la vicprezidanto **Zlatko Hinšt** post 28 jaroj da postenado. La ĝisnuna kasistino **Marta Dokić** restis en la estraro. Kutime funkciuloj estis la ĉefaj fortoj de agado en KFEA. Ni festis dum la jarkunveno la kontinuajn 65 jarojn de la agado de KFEA (1954-2019).

Marica Brletić estis sekretario (kune kun **Ivanka Glavina**) de FES Zagreb (1986-1992) kaj en periodo 2001-2010 la sekretario de IFEF kaj komitatanino de KFEA en IFEF. **Zlatko Hinšt** en la jaro 2018 fariĝis ĉefkomitatano de IFEF. Li estis multajn jarojn komitatano de KFEA en IFEF. Li ankaŭ estas aktiva en Faka komisiono, Terminara Sekcio kaj Faka Aplika Sekcio. Li ofte prelegis kaj artikolis dum kaj pri IFEF kongresoj kaj en KFEA. **M. Brletić**, **Z. Hinšt** kaj **R. Brletić-Višnjić** estis delegitoj kaj estraranoj, laboris kiel membroj de komisionoj pri inventuro kaj kontrolkomitatoj dum multaj jaroj en Kroata Esperanto-Ligo.

KFEA okazigis ĉi-jare memorgesperon pri forpasintaj esperantistoj por kiuj la jaro 2019 estas jubilea rilate la naskiĝon aŭ morton. **Marinko Gjivoje** elstara esperanta vortaristo, verkisto, iama sekretario de FES Zagreb kaj ĵurnalisto havas en la jaro 2019 la 100-an jubileon de la naskiĝo. La saman jubileon havas nia longjara membrino **Elfrida Koren**. La 120-an jubileon de naskiĝo atingis **Ilija Puhalo**, la iama vicprezidanto de Internacia Asocio de Esperantistoj Fervojistaj (IAEF) kiu en



La jubilea kuko. Fotis Janica Pezelj

la tiam zagreba sidejo eldonis oficialan organon, la fakrevuon „Fervojisto“. Ankaŭ estas inde memorigi pri 20 jaroj de la morto de **Velimir Lukež**, elstara membro kaj kursgvidanto. Pasis 10 jaroj de la morto de nia eksa prezidanto de FES Zagreb **Franjo Šlabek** kaj nia kasistino **Nevenka Palković**. En la jaro 2019 mortis membrino de KFEA ekde la jaro 1956, **Anka Špehar-Šantolić**. Ofte ni memorigis pri nia plej elstara membro **Josip Zupanić**, kunfondinto kaj vicprezidanto de FES Zagreb, aktivulo en IFEF je la kampo de fervoja terminologio, iama redaktoro de „Jugoslavia Fervojisto“.

Dum regulaj kunvenoj en ejoj de KFEA okazadis/-as diversaj prelegoj, raportadoj kaj informadoj rilatantaj al la problemaro trafika aŭ lingvaj. Ofte ni traktis temojn ligitajn kun vojaĝoj, historio, movadaj aktualaĵoj kaj aliaj. Ekzistis/-as kunlaboro kun aliaj esperantaj organizoj kaj vizitoj. Ofte ni havis gastoj-prelegantojn. **Roža Brletić-Višnjić** organizis plurajn ekskursojn kaj vojaĝojn, precipe per trajno. Dum pluraj jaroj de nia agado membroj partoprenis multajn esperantajn renkontiĝojn kaj IFEF-kongresojn. Lastajn jarojn mankas niaj vizitoj al internaciaj renkontiĝoj kaj al aliaj eventoj. Post kiam **Kroatio** ekmembris en Eŭropa Unio, KFEA preskaŭ restis sen mono, sen fonto de regula financado. Estus grave pliigi membronombron, ŝanĝi entute nefavoran situacion. Tio postulas novajn fortojn kaj novajn paŝojn.

Zlatko Hinšt

Kroata Esperanto-Ligo direktas siajn bondezirojn okaze de la 65a jubileo de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio.
<http://www.esperanto.hr/fervojisto.htm>



Feliĉan Kristnaskon!
Feliĉan jaron 2020!



Mortis la Nepo. La 9an de oktobro 2019 en Francio mortis la nepo de Lazaro Ludoviko Zamenhof, Louis-Christophe Zaleski Zamenhof, nomata Ludoviko. La Nepo kiun ni kutimis skribi per majusklo kaj kiu peris al ni la detalojn tre homaj el sia rilato kun la avo. La majuskla Avo.

Per la morto rompiĝis la rekta fadeno kiu nin ligis al la familio en kies sino naskiĝis nia lingvo. Tre homan momenton mi memoras el lia infanaĝo, ne nur tiun teruran kiam oni portis lin sur la ĉaro por la mortintoj el la varsovia Umschlagplatz. (Ni dankas al Roman Dobrzyński ke li persistis dum pluraj jaroj pri la intervjuoj el kiuj estis kreita „La Zamenhof-Strato“.) La Nepo estis la heredanto de la poŝtmarkoj kiujn la unuaj parolantoj de nia lingvo gluis al siaj jesaj poŝtkartoj. Ludoviko Zamenhof, kiun la civila vivo poste konos kiel Christophe Zaleski, memore al lia savo el la getto, embarase konfesis, kiam Varsovio cindriĝis sub la bomboj de la germanaj aviadiloj, plej trafis lin, knabeton, la cindroj de la filateliaz albumoj de la Avo. (Li rajtis foliumi la albumojn dimanĉon en la lito dum bonodoris la matenmanĝo de la panjo Wanda.)

Mi memoras Ludovikon el iu privata konversacio. Ĝi okazis en LKK-ĉambro de la Universala Kongreso en Adelajdo (aŭ ĉu estis en Prago?). Li kun kontento aŭdis ke Zagrebo gastigos la Universalan Kongreson en 2001. Milda rideto sur la vizaĝo.

- Zagrebo estas al mi aparte kara. Tie loĝis la knabino kiun mi amis junaĝe.
- Ĉu?

Mi ne sciis ke en lia privata filatelia albumo mia urbo lumas alilume.

Scivola pri la vivo de la familanoj Zamenhof, mi demandis aŭdace.

- Ĉu vi povus diri al mi ŝian nomon?
- Mi ne povas.- Li jam bedaŭris ĉar li diris tro kaj pretis fini la temon.
- Ĉu vi eble povus skribi ŝian nomon?

Kuraĝe mi etendis etan kajereton el mia sako. Skribilo estis en lia mano. Per lia bela manskribo li enskribis la nomon kiu al li estis kara. La hoko sur la lasta litero estis iom granda.

Mi danke foriris, riĉa pro la sekreto.

La nomo ne apartenis al la konataj homoj en nia Rondo Familia. Hejme mi longe serĉis ĝin en la telefonlibro de Zagrebo. Jen ĝi! Mi hezitis.

Mi sendis leteron.

Post kelkaj tagoj malfermiĝis de pordo de nia Esperanto-Klubo. Eleganta damo eniris ridetanta.

- Tio estas mi.

Nia Esperantujo riĉiĝis per ŝia reveno.

Lastfoje mi vidis ŝin en Etnografia muzeo. Ni festis la centan naskiĝjubileon de Tibor Sekelj. Post la programo ŝi petis min flanken. Sub iu masko el Nov-Gvineo ŝi malfermis sian belan sakon kaj diris ke ŝi havas ion por mi. Estis koverto kiun ŝi etendis al mi:

- Por la estonta ejo!

Hodiŭ vespere kiam studento Robi enmetos la ŝlosilon en la seruron por malfermi nian novan esperantejon al studentoj, neniu scios kiom da amo estas en la ŝlosilo.

Eble mi aĉetu iun seruran oleon por ke ĝi pli facile turniĝu.

Spomenka Ŝtimec

VLADO JURKOVIĆ (1931 - 2019)

Vlado Jurković mortis la 21an de januaro 2019. Li naskiĝis en Zagrebo la 16an de januaro 1931. Li esperantistiĝis dum la juneco en 1955 ĉe Željko Takač. Lia esperanteco estis por li iel tute natura, io normala, memkomprenebla, kvazaŭ aliel ne povus esti.



Kun Vlado mi longjare kunlaboris en kadro de la esperantlingvaj elsendoj de Radio Zagreb, kiuj okazis kontinue ekde 1955 ĝis aŭgusto 1992. Li ofte kontribuis en la elsendo kun siaj surbendigitaj radio-raportoj pri diversaj Esperanto-eventoj. Modesta kaj izolema homo, li ĉiam pretis fari ion ajn por Esperanto en kadro de sia ĵurnalista metio, kaj estis kontenta pro tio. Li ŝatis la fakton ke li pro sia laboro estis distingita de la ŝtatprezidanto Tito per laborodeno kun arĝenta girlando.

Ni neniam, dum nia duonjarcenta amikeco nek kverelis nek koleriĝis nek ofendiĝis unu pri la alia.

Estante pensiulo, Vlado ŝanĝis mikrofonon por herboj kaj iĝis herbisto, kolektanto de kuracplantoj, plej ofte plukitaj sur la monto Velebit. Kaj inter la vagadoj tra Velebit li flugis ofte al Litovio, kie li trovis amikinojn. Esperantistinojn, kompreneble.

Ripozu en paco, Vlado! Surbendigu magnetofone viajn diskojn kun kuracplantoj sur la sunoplenaj ĉielaj herbejoj. Esperantlingve, kompreneble.

Damir Mikuličić

http://www.esperanto.hr/audio_jurkovic.htm

VERDA POEMO

Figuro borderita per nigreco
Kaj plenigita kun koloroj.
Meditema kaj sendorma.
En fendo inter deziroj kaj plenumiĝoj.
En nekaptebla momento de prezenco.
Kio vi estas?
Ies ideo.
Ies sankteco.
Ies kondamno.
Ies destino.
Aŭ nur figuro borderita per nigreco
Kaj kolorita verde?

Mihaela Cik

KORVOJ

Hodiaŭ dum promeno frumatena
Mi vidis korvon, amikon jam de jaroj,
Sidantan sur la fosto de lanterno
Ankoraŭ pallumanta. Per rauka krio
Ĝi min rekonis, levis dignopeze
Flugilojn vastajn por majesta ŝvebo
Trans la tagmentojn de proksimaj domoj.

Jam frostas sur la montoj, mi ekpensis,
kaj iris plu medite pri la roloj
de tiuj nigraj birdoj en poetiko
antikve kaj poste.

Jen konvencioj
sekvendaj al poetoj priskribantaj
batalojn de herooj, tie korvoj
ĉiam proksimas al la malavaraj
donantoj de kadavroj; kaj jen simboloj
vesignaj en poemoj kaj rakontoj
groteske romantikaj, kaj tiel plu.

Sed miaj korvoj estas ne simboloj,
fizike vivaj ili estas, kunvenantoj
sur rokoj antaŭvintre por dividi
inter si bienojn, nutrofontojn
homloĝajn, ankaŭ en ĉi tiu urbo.

Mi ŝatas tiujn birdojn, neperturbeblajn
de la trafik' matena, observantajn
kun digno, sobre, la strangajn manierojn
nervozajn de la homoj, infiniton
ili sugestas per nigro kaj majesto
kongrue kunesencaj, liberaj fine
de konvenciaj muldoj poetikaj.

Pro tio mi salutas mian korvon
per vortoj senpretendaj, senafektaj,
kiel naturo diktas, kaj ĝi meritas.

26. 9. 2007.

Baldur Ragnarsson



Baldur Ragnarsson (1930 - 2018)

Islanda poeto, eseisto, tradukisto. Kandidato por Nobelpremio pri la esperanta literaturo de 2006 ĝis 2018. Profesie instruisto kaj lerneja inspektoro. Publikigis naŭ poemarojn en Esperanto, du en la islanda. Tradukis sep librojn el la islanda literaturo al Esperanto. Aŭtoro de multaj faklibroj.

Baldur Ragnarsson (1930. - 2018.)

Islandanin. Pjesnik, esejist, prevoditelj. Kandidat za Nobelovu nagradu za književnost 2006-2018. Po zanimanju nastavnik i školski inspektor. Objavio devet zbirki pjesama na esperantu, dvije na islandskom. Preveo sedam knjiga islandske književnosti na esperanto. Autor brojnih stručnih knjiga.

GAVRANI

Danas tijekom jutarnje šetnje
vidio sam gavrana, prijatelja godinama,
kako sjedi na stupu lanterne
bljedunjavo svijetle. Promuklim krikom
prepoznao me, podigao dostojanstveno
svoja široka krila za veličanstven let
preko krovova obližnjih kuća.

Već se smrzava u planinama, pomislio sam
i nastavio hodajući razmišljati o ulogama
tih crnih ptica u poetici
antičkoj i novijoj.

Te konvencije
pristaju pjesnicima koji opisuju
junaštva heroja, u njima su ovi gavrani
uvijek blizu leševa
koji im se nude; evo simbola
u znaku jauka u pjesmama i pričama
groteskno romantičnim i sličnim.

No, moji gavrani nisu simboli,
oni su fizički živi, okupljeni
na stijenama prije zime da podijele
između sebe imanja, izvore hrane
za preživljavanje u ovom gradu.

Volim te ptice, jutarnji promet
ne ometa, koje se ophode
dostojanstveno, trezveno, daleko od
nervoznih ljudi, sugerirajući beskraj
svojim crnim i veličanstveno usuglašanim
zajedništvom, oslobođenim od svih
konvencija uhodanih poetika.

I zato pozdravljam svog gavrana
nepretencioznim riječima, bez afekata,
kako to priroda nalaže i on zaslužuje.

26. 9. 2007.

Baldur Ragnarsson

*Preveo s esperanta
Božidar Brezinščak Bagola*

